Cena numeru podwójnego 1 złoty.

POLA ESPERANTISTO

(Esperantysta Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

Redakcio kaj Administracio: Widok 19, Warszawa.
Jarabono: en Polujo 6 złoty, eksterlande samvaloro de 6 orfrankoj.
La Redakcio ne resendas manuskriptojn; konservu kopion.

Redaktoro kaj Eldonanto:
STANISŁAW KAROLCZYK.

Subtenantoj:
Prof. Dr. ODO BUJWID
JAN KOSTECKI
Dr. EMILJAN LOTH
WŁODZIMIERZ MIERNICKI

ENHAVO:

Sprawozdanie Zarządu Centralnego Polskiego Tow. Esperantystów za rok 1924. — Jan Kostecki: Kiel eviti la disfaion en dialektojn? — Th. Cart: La sistemo de Dro Zamenhof pri landnomoj. — H. Hempel: Doloriga gajnrimedo. — St. Br.: El la intimajoj de Louz'a Esperantujo. I. Fragmento el stancoforma kuirverko. — Dr. Mędrkiewicz: Aplombo! — A. Niemojewski: Tammuz kaj Iŝtar (trad. Włodz. Pfeiffer). — Dr. M. Blassberg: Prof. Wicherkiewicz o Esperancie. — Pola Akademia Esperantista Societo. — Z Polskiego Akademickiego Towarzystwa Esperantystów. — T. K.: Uniwersalne cechy i zalety języka Esperanto. — Miesiąc esperancki. — Ricevitaj gazetoj.

JARO XIX. WARSZAWA — Januaro | Februaro № 1|2 (111|112).

Zebrania Polskiego Tow. Esperantystów w Warszawie (Królewska 19) odbywają się co środa od 8 do 10 wiecz., zaś kancelarja i biblioteka czynne są we środy i piątki od 7½ do 9 wieczór.

Niaj subtenantoj.

Nia gazeto, farîĝinta en la pasinta jaro pivata eldonaĵo de la Redaktoro, bezonas tamen, almenaŭ en la komenco, la bonvolan materialan helpon de tiuj polaj Esperantistoj, al kiuj ĝia progreso estas kara kaj kies cirkonstancoj tion permesas. Ju pli da subtenantoj anonciĝos, des pli enhavoriĉa, lukso kaj des pli efika estos la „Pola Esperantisto",

unika esperanta revuo por Poloj.

La nomaron de la subtenantoj ni ĉiam presos sur la unua paĝo de la kovrilo.

Farîĝi subtenanto de „Pola Esperantisto" povas ĉiu persono, kiu enpagos monate po Zł. 20.—

Subtenantoj ricevas sen plua pago 2 ekzemplerojn de la gazeto.

Eldono de

„Pola Esperantisto"

Widok 19, Warszawa.

POLA ESPERANTISTO

(Esperantysta Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ

JARO XIX. WARSZAWA — Januaro | Februaro 1925. № 1|2 (111|112)

Sprawozdanie Zarządu Centralnego Polskiego Towarzystwa Esperantysów za rok 1924.

Rok ubiegły zaznaczył się żałobnym dla wszystkich esperantystów wydarzeniem: dnia 6 grudnia rozstała się z tym światem Doktorowa Klara Zamenhof.

Małżonka naszego Mistrza, gorliwa Esperantystka, od pierwszej chwili istnienia ruchu naszego aż do momentu swego zgonu brała najżywszy udział we wszystkim, co przyczynić się mogło do rozwoju idei esperanckiej, do zgody i solidarności poszczególnych naszych ugrupowań.

Polskie Towarzystwo Esperantystów utraciło w Zmarłej swą długoletnią Członkinię Honorową, zawsze pełną troski o jego dobro i chętną do rady i poparcia. Jeszcze w ostatnim roku swego życia Klara Zamenhof przyjęła protektorat honorowy V Kongresu Towarzystwa, a zmuszona podczas jego obrad do pozostania zagranicą na kuracji, nadesłała stamtąd depeszę z życzeniami. Działalność przedstawicieli Towarzystwa na XVI Międzynarodowym Kongresie w Wiedniu cieszyła się jej gorącym poparciem; z radością też powitała jednomyślne przyjęcie przez ten kongres wniosku Towarzystwa. Złożona już śmiertelną niemocą, przesłała nam jeszcze na kilka tygodni przed zgonem swe pozdrowienia i życzenia owocnej pracy. Cześć jej zacnej pamięci!

W pierwszych miesiącach roku sprawozdawczego wysiłki Zarządu skierowane były głównie ku należytemu przygotowaniu V Kongresu Polskiego Tow. Esperantystów, zwołanego do Warszawy na dzień 7—10 czerwca 1924 r. Utworzone już w końcu roku poprzedzającego komisje odbyły szereg posiedzeń przygotowawczych i opublikowały w prasie komunikaty, dotyczące jego organizacji. Komisja rozrywkowa urządziła wieczór artystyczno-taneczny, w uprzejmie udzielonych przez członka Zarządu p. Miernickiego salonach. Dochód z wieczoru tego

przyniósł poważnę kwotę z górą 150 złotych, która zasiliła kasę kongresową. Komisja pedagogiczno-literacka ogłosiła poczwórny konkurs i ustaliła warunki egzaminów dwustopniowych. Komisja organizacyjna przygotowała program obrad kongresu.

Szereg odezw, wydanych przez komisje, zachęcał ogół esperancki do poparcia usiłowań komitetu. Mimo to, do końca kwietnia wpłynęło tak mało zapisów, że komitet zmuszony był przestawić datę kongresu na termin powakacyjny, mianowicie 6, 7 i 8 września. Winę przypisać tu należy zadziwiającej bierności niektórych grup prowincjonalnych, które nie rozumieją jeszcze dostatecznie potrzeby i korzyści konsolidacji ruchu naszego.

Wobec zbliżającego się kongresu w Wiedniu, Zarząd poczynił u władz starania celem uzyskania paszportów ulgowych dla uczestników tego kongresu. Starania te, zwłaszcza dzięki poparciu i osobistym zabiegom prz. Bujwida oraz Członka Zarządu p. Kazimierza Zajączkowskiego i energicznej działalności p. Władysława Poznera, uwieńczone zostały pomyślnym rezultatem. Nietylko wszyscy wyjeżdżający na kongres Członkowie Towarzystwa uzyskali paszporty ulgowe, ale nawet byliśmy w możności poczynić pewne ułatwienia dla esperantystów krakowskich oraz niektórych osób z Warszawy, nie należących do Polskiego Tow. Esperantystów.

W dążeniu bo nawiązania zerwanych od dłuższego czasu stosunków z innemi ugrupowaniami esperanckiemi w kraju, Zarząd zaprosił w końcu czerwca roku ubiegłego przedstawicieli tych ugrupowań i zaproponował im odbywanie stałych miesięcznych zebrań informacyjnych delegatów poszczególnych stowarzyszeń. Instytucja zebrań tych, pod nazwą „delegitaro", przetrwała oficjalnie do chwili obecnej, aczkolwiek nie wykazała pożądanej żywotności, najzupełniej bez winy Zarządu. Reprezentacja Towarzystwa nie opuściła ani jednego posiedzenia „delegitaro", natomiast cały szereg posiedzeń nie doszedł do skutku z powodu nieprzybycia części lub wszystkich przedstawicieli innych ugrupowań. Jedynym realnym owocem dotychczasowej współpracy jest wspólne podpisanie przez wszystkie biorące udział w „delegitaro" towarzystwa petycji do Ministerstwa Oświaty w sprawie wprowadzenia nieobowiązkowych wykładów Esperanta do szkół.

Wobec ustawicznych ataków gazety „Litova Stelo" na Rząd i Społeczeństwo polskie, Zarząd uznał za stosowne jeden z najbardziej drastycznych artykułów tej gazety, p. t. „Straszliwy terror polski w Wilnie" przełożyć na język polski i wysłać do Prezydjum Rady Ministrów z prośbą o udzielenie właściwego sprostowania. Po upływie kilku miesięcy sprostowanie takie,

bardzo szczegółowe i rzeczowe, otrzymaliśmy i po przetłumaczeniu na Esperanto zostało ono wydrukowane w numerze 107|108 „Esperantysty Polskiego". Uprzednio już, w Nr. 99|100 „Esperantysty Polskiego", Redakcja tegoż pisma zamieściła artykuł p. n. „Litova Stelo", wyjaśniający czytelnikom zagranicznym bezzasadność i stronniczość napaści tej gazety na Polskę.

W roku ubiegłym ukazała się w przekładzie esperanckim książka b. prezesa ministrów włoskich Nittiego p. t. „Europa nad przepaścią", która w sposób oczywiście niesprawiedliwy i wyraźnie fałszywy przedstawia stan polityczny Europy powojennej, atakując przytym specjalnie Polskę, Francję i nowopowstałe państwa słowiańskie. Uważając, że ataków tych niepodobna pozostawić w świecie esperanckim bez odpowiedzi, Zarząd uprosił Członka swego, D-ra S. T. Karlsbada o opracowanie szczegółowej krytyki tej książki i krytykę tę, za uprzejmą zgodą Redakcji „Esperantysty Polskiego", opublikował w Nr. 104|105 tegoż pisma. Znalazła ona sympatyczny oddźwięk nawet w prasie polskiej, która, jak np. warszawski „Kurjer Poranny", bardzo pochlebnie wyraziła się zarówno o jej tendencji, jak i o wybitnych zdolnościach polemicznych szanownego autora, oraz w Minist. Spr. Zagran., które nawiązało kontakt z Tow. z tego powodu.

W początku sierpnia przybyła do Warszawy wycieczka Gdańszczan, udających się na kongres wiedeński. Zarząd Towarzystwa ułatwił jej zwiedzanie naszego miasta, a niektórzy z Członków uprzejmie użyczyli swych lokali na noclegi, podtrzymując w ten sposób dawną tradycję gościnności esperanckiej.

Na XVI kongresie międzynarodowym w Wiedniu (6-12 sierpnia 1924 r.) Polskie Towarzystwo Esperantystów reprezentowali oficjalnie: Prezes Prof. Odo Bujwid i Wiceprezes p. Jan Kostecki. Prócz nich, z pośród Członków Towarzystwa udział w kongresie brali: Doktorowa Klara Zamenhof, pani Tekla Essigmanowa, p. Józef Bacewicz, p. Stanisław Essigman, p. Jan Ferencowicz, p. Leon Ferencowicz, Redaktor „Esperantysty Polskiego" p. Stanisław Karolczyk, p. Stefan Lubliner, Członek Zarządu p. Włodzimierz Miernicki i inni.

Dzięki osobistym staraniom Prezesa Prof. Odona Bujwida, otwarcie kongresu uświetnił swą obecnością J. E. Minister Pełnomocny i Poseł Nadzwyczajny Rzeczypospolitej Polskiej w Wiedniu, Dr. Zygmunt Lasocki. Był on jedynym obecnym Ministrem obcego mocarstwa i zarówno jak inni przedstawiciele państw obcych, wygłosił przemówienie powitalne w języku narodowym i esperanckim.

Prezes Prof. Odo Bujwid wybrany został jednogłośnie oficjalnym przedstawicielem wszystkich obecnych na kongresie obywateli polskich i w tym charakterze był jednym z siedmiu Wiceprezesów kongresu, jako reprezentant jednego z krajów najliczniej udział biorących.

W dalszym rozwoju swej długoletniej walki o czystość i jedność języka Esperanto, Polskie Towarzystwo Esperantystów złożyło na Kongres Wiedeński wniosek rezolucji, zalecającej wszystkim esperantystom, oraz organizacjom i pismom esperanckim, posłuch dla opinji językowych Akademji Esperackiej i Komitetu Językowego. Wniosek ten przyjęty został jednomyślnie, a opozycja zdołała tylko wprowadzić doń parę drobnych poprawek formalnych, nie posiadających żadnego zasadniczego znaczenia. W ten sposób publicznie stwierdzoną została słuszność naszych zarzutów i szkodliwość działalności tych esperantystów, którzy wyłamują się z pod autorytetu Komitetu Językowego. Prezes Akademji Esperanckiej Prof. Cart, który, będąc ciężko chory, nie brał udziału w kongresie, pisał do nas później: „Z serca, z całego serca dziękuję wam. Wielką wartość miała i ma dla mnie wasza pomoc i współpraca... obecnie czuję się lepiej, po poważnej operacji — i żwawo pracować będę i walczyć, jeśli potrzeba, o nasze *zamenhofskie* Esperanto.

Po kongresie wiedeńskim Zarząd wszystkie swe wysiłki poświęcić musiał zbliżającemu się kongresowi Towarzystwa. Sytuacja była tym cięższa, że kilku członków komitetu kongresowego nie powróciło na czas do Warszawy, inni zaś w ostatniej chwili odmówili nam swej współpracy z powodu ważnych przeszkód osobistych. Mimo to wszystkie agendy komitetu, za wyjątkiem komisji rozrywkowej, udało się do życia powołać. Na siedzibę kongresu wynajęto mniejszą salę Towarzystwa Hygienicznego, a dzięki Staraniom Prof. Bujwida udało się urządzić podczas kongresu audycję radio, jedną z pierwszych w Warszawie. Wystawę esperancką przygotował Członek Zarządu p. Stankiewicz. Dekoracją sali zajmowali się pp. Jaraczewski i Pozner, zaś pani Cense wykonała 3 piękne flagi z nabytych przez Towarzystwo materjałów. Uczestników kongresu przybyło około pięćdziesięciu. Na kongres przysłały swych przedstawicieli wszystkie inne stowarzyszenia warszawskie, z prowincji zaś przybyło więcej przedstawicieli innych ugrupowań, niż reprezentantów Oddziałów i Członków-Korespondentów Towarzystwa. Widać z tego, że wiele Oddziałów naszych wymaga gruntownej rekonstrukcji wewnętrznej. Na prezesa kongresu powołany został jednomyśnie Prof. Odo Bujwid, Prezes Towarzystwa. Prelekcje wygłosili: w języku polskim — Dr. Szymon Karlsbad na temat organizacji wszechświatowej ruchu esperanckiego, w języku esperackim — p. prof. Antoni Czubryński

o propagandzie Esperanta w Polsce. Zgłoszono bardzo wiele wniosków, dotyczących propagandy i oficjalny wniosek Zarządu Centralnego w sprawie utworzenia na prowincji delegacji międzystowarzyszeniowych na wzór warszawskiej — przyjęty został jednomyślnie. Komisji Egzaminacyjnej przewodniczył Członek Honorowy Dr. Leon Zamenhof, wydała ona 3 świadectwa biegłości. Komisja Konkursowa odznaczyła oryginalną esperancką nowelę pani Heleny Hempel ze Lwowa. p. t. „La parazitaj meteoroj", opublikowaną następnie w spóźnionym Nr. 104|105 „Esperantysty Polskiego" Gościom prowincjonalnym uprzejmie pokazywała osobliwości Warszawy pani Cense.

Kongres oddał hołd pamięci Mistrza i Grabowskiego, składając na ich mogiłach wieńce, przyczym nad mogiłami przemawiał Prezes Prof. Bujwid. —

Dzięki gorliwej i owocnej propagandzie Członków naszego Towarzystwa p. p. Jana Ferencowicza i Edmunda Jaraczewskiego zaś w okresie przygotowawczym również p. p. Stefana Lublinera i Władysława Poznera, w sierpniu roku ubiegłego powstało jako organizacja samodzielna Polskie Akademickie Towarzystwo Esperantystów, które odrazu rozwinęło ożywiona działalność.

Towarzystwo to, wspólnie z Polskim Towarzystwem Esperantystów prowadzi obecnie drugi już kurs języka Esperanto, pod światłym kierownictwem pedagogicznym pani Eugenji Cense. Jednocześnie uczestnicy pierwszego kursu w dalszym ciągu prowadzą swą naukę na kursie wyższym.

Dla propagandy kursów oba Towarzystwa wydały wspólnym staraniem i nakładem afisz, który dwukrotnie już rozplakatowany był na mieście, jak również, dzięki zabiegom poszczególnych Członków, umieszczony w korytarzach i poczekalniach wielu instytucji publicznych i prywatnych.

Stosownie do uchwał specjalnej konferencji prasowej, odbytej podczas kongresu wiedeńskiego, Zarząd utworzył stanowisko Kierownika Propagandy Prasowej i powierzył je p. Stefanowi Lublinerowi (Zgoda 9, Warszawa). Zebranie Ogólne z dnia 12. XI udzieliło p. Stefanowi Lublinerowi w tym charakterze wszystkich praw Członka Zarządu. Do Kierownika propagandy prasowej nadsyłać należy wszelkie komunikaty, nadające się do opublikowania w prasie polskiej.

Pełen energji działacz esperancki, p. Czesław Pruski z Lublina prowadził w dalszym ciągu swą niezmordowaną propagandę, której pięknym rezultatem było powstanie w roku ubiegłym Oddziału Lubelskiego P. T. E. Oddział ten pod kierunkiem swego Prezesa, p. W. Bogusławskiego, rozwija się

pomyślnie, p. Czesław Pruski zaś nie zapomina i o prasie lubelskiej, w której bardzo często ukazują się artykuły i wzmianki jego pióra. Tę samą pochwałę oddać należy p. Włodzimierzowi Pfeiffrowi z Łodzi, który ponadto wziął na siebie ciężkie obowiązki korektora i współredaktora „Esperantysty Polskiego" od czasu, gdy jego druk przeniesiony został z Warszawy do tego miasta.

Z prawdziwym zadowoleniem podkreślić należy znacznie zwiększone zainteresowanie się prasy polskiej sprawami esperanckiemi. Prasa prowincjonalna, zwłaszcza w Małopolsce i w b. Królestwie Kongresowym, zamieściła wiele informacyj a nawet fotografij, dotyczących zarówno Kongresu Wiedeńskiego, jak i Kongresu Towarzystwa w Warszawie. Bardziej obojętną jest, niestety, prasa warszawska, ale i ta pomału wyrzekać się poczyna swych dawnych przesądów. Nasz silny ruch wszechświatowy, który przeszedł zwycięsko próbę wojny i dalej kroczy po nowe zdobycze dla dobra ludzkości i narodów, daje codzień nowe dowody, że liczyć się z nim trzeba poważnie. W prasie warszawskiej na specjalną wzmiankę zasługuje stała rubryka esperancka w piśmie „Radio-Amator", które w ten sposób nawiązuje nici łączności między dwoma gienjalnymi wynalazkami czasów ostatnich.

W październiku święciła Polska uroczystość powrotu zwłok Sienkiewicza do kraju. Imieniem esperantystów polskich już na granicy powitał je Prezes Towarzystwa, Prof. Odo Bujwid — i złożył wieniec z napisem: „*Al Granda Verkisto - esperantisto, polaj*". Oddział Warszawski Towarzystwa złożył drugi wieniec, z napisem: „*Henrykowi Sienkiewiczowi — Polskie Tow. Esperantystów*". Oba wieńce niesione były przez delegację Towarzystwa w kondukcie pogrzebowym w Warszawie.

Dnia 8 grudnia w pogrzebie Małżonki Mistrza wziął udział Zarząd z wieńcem, zaś nad zwłokami przemawiało 3 Członków Towarzystwa: Członek Honorowy Leo Belmont w imieniu wszystkich esperantystów, pani Eugenja Cense — w imieniu esperantystów-cudzoziemców i Wiceprezes p. Jan Kostecki w imieniu Polskiego Tow. Esperantystów oraz Polskiego Akademickiego Tow. Esperantystów.

Starania o utworzenie kursów Esperanta dla funkcjonarjuszy Policji Państwowej oraz o utworzenie polskiego oddziału Wszechświatowej Esperanckiej Ligi Policyjnej prowadził z powodzeniem, z pośród Członków Towarzystwa, Członek Zarządu p. Lubliner. Wyrazem przychylnego stanowiska władz policyjnych jest wydany do wszystkich urzędów policyjnych Rzeczypospolitej cyrkularz, zarządzający ankietę co do ilości policjantów,

znających Esperanto lub pragnących uczyć się tego języka. W dalszym rozwoju sprawy, przybyły specjalnie do Warszawy Prezes Towarzystwa Prof. Odo Bujwid czynił osobiste starania. Zamierzone równocześnie złożenie petycji do Ministerstwa Oświaty w sprawie nauki Esperanta w szkołach musiano chwilowo powstrzymać, z powodu zmiany na stanowisku Ministra.

Dnia 15 grudnia odbyła się staraniem koła „Konkordo", a z udziałem prawie wszystkich innych towarzystw warszawskich uroczystość t. zw. „Dnia Zamenhofa", którą esperantyści warszawscy po raz pierwszy od czasów przedwojennych obchodzili wspólnie. Imieniem Polskiego Tow. Esperantystów głos zabierali Prezes Prof. Bujwid i pani Cense.

Po raz pierwszy też od czasów przedwojennych w roku ubiegłym Zarząd był w możności wprowadzić pewne najkonieczniejsze ulepszenia w urządzeniu bibljoteki Oddziału Warszawskiego. Mianowicie, za sumę 140 złotych nabyto drugą szafę, a ponadto oprawiono kilka najbardziej cennych książek, jak dzieła Grabowskiego z dedykacjami i własnoręcznemi dopiskami oraz dawne roczniki „Pola Esperentisto". Dalsza praca polegać będzie na skatalogowaniu dzieł dotąd nieuporządkowanych wskutek braku miejsca, a także — w miarę możności — kontynuowaniu oprawy książek broszurowanych, których w obecnym stanie wypożyczać niemożna. Gorące podziękowanie należy się Redaktorowi „Esperantysty Polskiego", p. Stanisławowi Karolczykowi, za ofiarowanie bibljotece Towarzystwa cennego zbioru książek i gazet oraz obietnicę, że i nadal przekazywać jej będzie esperanckie nowości wydawnicze.

Na wzniesienie pomnika na mogile Mistrza w Warszawie, Zarząd w ciągu roku ubiegłego organizował dwukrotnie kwestę wśród Członków oraz opublikował w „Esperantyście Polskim" odpowiednią odezwę. Ofiary, przez Członków Towarzystwa a ten cel złożone, wyniosły Mkp. 205,000.000 i złotych 200, oraz 20 koron duńskich i 1 dolar.

Rozpoczęte obecnie prace Zarządu zmierzają przedewszystkim: do ukonstytuowania Wydziału Propagandy, który y zajął się w pierwszym rzędzie zdobyciem środków materjalnych dla propagandy; do zorganizowania stałych miesięcznych wieczorów literackich dla Członków Oddziału Warszawskiego (kierownictwo tych wieczorów objęła łaskawie pani Eugienja Cense), do ożywienia tych Oddziałów prowincjonalnych, które w roku zeszłym wykazały bardzo wątłą działalność, do wykonania w miarę możności wszystkich uchwał V Kongresu Towarzystwa oraz do zwołania VI Kongresu w roku bieżącym, łącznie z II Kongresem Wszechpolskim, lub niezależnie od niego, gdyby tenże znowu został odłożony.

Wszystkie te zadania wymagają czynnej współpracy Członków Towarzystwa. Siły każdego zarządu są z konieczności ograniczone i warunkiem wydajności jego wysiłków jest poparcie ze strony zrzeszonego ogółu. Dla naszej wielkiej idei nadchodzą lepsze czasy, ale potrzeba teraz zbiorowej woli i zbiorowej mocy, by przezwyciężyć ostatnie przeszkody. Każda odrobina czasu i pracy, jaką nam mogą poświęcić nasi Członkowie, przyjęta będzie przez Zarząd z wdzięcznością. Także indywidualna propaganda posiada ogromne, a w ostatnich czasach niedostatecznie wyzyskiwane znaczenie. Nigdy nie należy o tym zapominać, że gdyby każdy z nas zwerbował choćby jednego esperantystę w ciągu roku, to pod jego koniec nasz ruch krajowy byłby dwukrotnie silniejszy.

Ze starym hasłem, z dobrych dni istnienia Towarzystwa, dni Mistrza i Grabowskiego, zwracamy się do Was u progu nowego okresu:

„Ĉiu en sia agu sfero
Laŭ inspiro Dia
Mem venke kronos sin afero
— En Ago venko ma!“

Kiel eviti la disfalon en dialektojn?

En Nr. 293 de la ĝeneva „Esperanto“, Dro Edmond Privat, prezidanto de nia internacia „Centra Komitato“, publikigis artikolon s. t. „Ĉu disfalo en dialektojn?“. En ĝi li kontraŭbatalas la opinion de tiuj, kiu timas, ke la lingvo internacia devas disfali, kaj pruvas, ke lingvoj *naciaj* eliris jam el la periodo de apartiĝado kaj troviĝas nune sub forta tendenco unuiga, kiun favoras: Ŝtato, kulturo, preso.

La estimata aŭtoro estas tute prava. Tiel nomataj „popolaj dialektoj“ — kaj preskaŭ en ĉiu lando ili estas multnombraj — vivetas apenaŭ sub la peza puŝo de oficiala lingvo Ŝtata aŭ nacia, lingvo forta pro sia vasta utileco, neŝanĝema pro skribe fiksita gramatiko kaj vortaro, kiun kontraŭ troa reformado defendas la aŭreolo de t. n. „lingva spirito“. Pro tiu spirito ja oni neis (oni neas ankoraŭ), ke individuo povu kreĉ lingvon, kiu ne estus „morta“. Kontraŭbatali la superforton de lingvo nacia kapablas nur tiuj popolaj dialektoj, kiuj mem estas armitaj per presita literaturo, do malantaŭ kiuj staras ia pli vasta organizita homa anaro, nacieto aŭ gento, konscia pri propra aparteco. Tamen la Ŝtato, ĉirkaŭvolvanta modernan individuon per tiom da diversaj ligiloj, devigas lin koni la lingvon Ŝtatan; tiu lasta potence, kaj tre ofte venke konkurencas kun la lingvo genta.

Jen kia estas la stato de dialektoj rilate al lingvoj naciaj: Ni komprenas, ke ju pli forta kaj pli bone konstruita estas la organismo homa, kiu staras post lingvo nacia, des pli sukcese ĝi povas detrui ĉiun konkurencon, unuigi kaj ensorbi la individuojn, kiuj apartenas al la organismo.

Plej forta, nature, estus lingvo internacia, universale akceptita. Ĝi lasus la vivon al lingvoj naciaj por plua loka uzo, sed ĝi postulus nerepuŝeble la *dulingvecon*, kaj havante post si la organismon de tuta homaro kun ĉiuj ĝiaj intelektaj riĉajoj, ĝi baldaŭ akirus tian potencon kaj disvolviĝon, kiun ne konis ĝis nun iu homa parolo. Tiam ĝi, certe, ne bezonus timi dialektojn. Ĝian gramatikon defendus la plej minaca „lingva spirito", kiu iam ajn ekzistis. La radikojn de ĝia vortaro diskurigus tra la mondo miloj da ĉiutagaj ĵurnaloj, centmiloj da libroj; senĉese transportus ilin radi-ondoj de ĉiuj longecoj; konstante elparolus ilin buŝoj de milionoj — ili sonus en la oreloj de ĉiu kaj ĉie.

Jen lingvo internacia. Sed nia nuna Esperanto? Ĉu pri ĝia sorto ni povas esti tute trankvilaj? Ĉu ne minacas ĝin disfalo? Ĉu havas ĝi sufiĉajn kaj sufiĉe certajn defendantojn?

En 1887 aperigis la Majstro sian libreton. Kiu staris post ĝi tiam? — Li kaj kelkaj proksimuloj. — Kaj nun, en 1925? — Kelkaj dekmiloj da personoj, inter kiuj eble unu milo parolas flue. Ĉu la plej malforta „popola dialekto" ne havas pli da adeptoj?

Nu, Esperanto estas ja verko de geniulo, ĝi estas tiu lingvo, kiu pro sia simpleco kaj beleco povas kaj devas fariĝi la internacia.

Sed kio okazis intertempe? — En 1908 S° Ido (aŭ S° de Beaufront, se vi preferas) kreis sian lingvon. — Kiu staris post ĝi tiam? — Li kaj kelkaj proksimuloj. — Kaj nun, en 1925? — Kelkaj centoj da personoj, el kiuj eble kvindek parolas flue.

Naskiĝis poste Esperantido, Medialo, ĵargono de Prof. Ankeisto, kaj tiom da aliaj.

Kio ili estas? Novaj lingvoj? — Ne! Ĉiuj baziĝas sur modernaj nacilingvoj, sur la principo de simpligo de gramatiko, internacieco kaj facileco de radikoj. De la ideo de Dro Zamenhof elkreskas tiuj basterdoj, malpli belaj ol la legitima filo, kaj certe ne malpli similaj al Esperanto, ol „popolaj dialektoj" al la ĉefa nacia lingvo.

La internacieco de Esperanto kaj la epoko de reganta Presmaŝino ne defendis do nin kontraŭ dialektoj. Kial? — Ĉar Esperanto troviĝas en tiu periodo de sia evoluo, kiun la modernaj naciaj lingvoj trapasis antaŭ jarmilo: ĝi estas idiomo de malgranda gento, neorganizita, dissemita inter arbaregoj kaj montaroj de landlimoj — kaj krome uzanta la parolon nur *helpe*, do dum relative malofta momentoj.

Tamen eksterordinara gento ĝi estas. Ĝiaj anoj ne loĝas en kavernoj, kaj ne kovras sian nudecon per feloj. Ili ĉiuj scias legi, kaj eble 20% inter ili finis aŭ finos superajn lernejojn. Ili ĉiuj veturadas en vagonaro, kaj iaj flugas per aeroplano. Ili aŭskultas radiokoncertojn...

Sed tiujn argumentojn nuligu: ĉar la malamikaj gentoj bastardaj troviĝas en sama kondiĉo.

Kontraŭ naskiĝintaj jam kaj ĉiumomente naskiĝeblaj novaj dialektoj ni havas nur unu (kaj kiel bonegan!) ŝildon: la geniecon de la Aŭtoro de Esperanto, kiu faris sian verkon tiel perfekta, ke la reformantoj nenion povis pli taŭgan aldoni kaj per ĉiuj ŝanĝoj ĝin difektas. Ni havas, plue, nur unu rimedon: *gvanlin organizon*, kiu de primitiva gento *per disciplino* levos nin al la stato de saĝe gvidata Internacia Popolo, neniajn jam dialektojn devonta timi.

Organizo apogita je disciplino — jen kio ĉiam kaj ĉie venkas. Ĝi ekstermis sovaĝajn bestojn kaj ekstermas venenajn bakteriojn. Ĝi konstruis urbojn kaj ŝtatojn. Ĝi malfermis al homo profundaĵojn de l'maro kaj aerajn senfinojn.

En la sfero de lingvo internacia, tiu organizo nomiĝas: *Lingva Komitato*, tiu disciplino: *obeemo al ĝiaj opinioj*. Ĉiu deklino, eĉ plej malgranda, de la vojo, montrita de nia „unika kaj plej alta aŭtoritato", kiel nomis la Lingvan Komitaton ankaŭ la lasta Viena Kongreso, malfermas kampon por nova ŝismo, preparas la naskiĝon de unu plua „dialekto de Esperanto".

Hodiaŭ vi ŝanĝas unu sufikson. Vi kredas, ke tio ne estas grava. Sed morgaŭ venas alia sinjoro, kiu ŝanĝas 10 formojn gramatikajn kaj enkondukas 100 novajn radikojn. Kion vi diros al li? Ke, por la bono de lingvo internacia, li obeu la Lingvan Komitaton? Sed vi mem ne faris ja tion. Per via neprudenta kvankam ŝajne bagatela ago, vi lasis fali el via mano la solan armilon, kiun vi havis kontraŭ nova dialekto. La principo de disciplino estas piedpremita kaj plu ne ekzistas. Malfermiĝis abismo de ĥaoso, libera spaco por ĉiu lingvobakisto — kaj plej fortan frapon estas suferinta la ideo mem de helpa lingvo tutmonda. Ĉar kiu iam volos lerni ĝin, kia internacia korpo ĝin akceptos, se ĉiutage aperos novaj projektoj, novaj dialektoj kun kvindek parolantoj?

Unu punkto, unu sufikso ne estas multe. Sed ni memoru, ke en la historio de l'mondo unu punkto ofte fariĝis roko, sur kiu rompiĝis milobble plforta movado, ol la nia hodiaŭ.

Urbo Genève vidis tian rokon. Cauvin kaj Zwingli, du fervoraj konstruantoj de la Reformita Eklezio, ne povis konsenti pri unu nur punkto de la religia dogmo. Kaj la tuta potenca fluo spirita disfalis en du malamikajn riverojn. Anstataŭ unu, fondiĝis du Eklezioj, interbatalantaj per fajraj ŝtiparoj pri vera ideo de Kristo.

Kaj la Krucumito el sub sia dorna krono rigardis la homan frenezon, benis al homa sufero...

Jan Kostecki.

La sistemo de Dro Zamenhof pri landnomoj.

Tie ĉi mi deziras simple klarigi por tiuj, kiuj ĝin ne bone komprenis, la sistemon de nia Majstro pri la Landnomoj.

1-a Koncerne la landojn de la Malnova Mondo (Eŭropo, Azio) la „indiĝena" popolo donas sian nomon al la lando:

Germano-Germanujo

Ĉeĥo-Ĉeĥujo, Slovako-Slovakujo kunmetitaj:

Ĉeĥoslovakujo k. t. p.

Tamen la landnomojn, kiuj finiĝas per... *lando,* Dro Zamenhof konservas senŝanĝe:

Holando (regnano: *Holandano*).*)

2-e Koncerne la landojn de la Nova Mondo (Ameriko, Afriko, Aŭstralio), kie la „enmigrantoj" fakte malaperigis la indiĝenan popolon, li alprenas la nomon mem de la lando, esperantiginte ĝin:

Peruo (Peruano), Maroko (Marokano) k. t. p.

3-e Koncerne la nomojn de la provincoj: la provincan nomon, esperantiginte ĝin, kiam eble.

Ĉu ne klara, ĉu anarkia tia sistemo? *Ne?*

„Neniu sistemo" (pri la Landnomoj), skribis Prof. Grosjean-Maupin, la Akademia Raportinto pri la demando (1922), estas plene rekomendinda el *teoria* vidpunkto; pro tiu ĉi motivo ni devas konsideri nur la *praktikan* vidpunkton, el kiu la fideleco al la ĝisnuna tradicio (la Zamenhofa) estas pli sendanĝera, ol ia ajn provo".**)

TH. CART,
PREZIDANTO
DE LA LINGVA KOMITATO ***)

Doloriga gajnrimedo.

Unu pola urbano, nome Marmurek, ekaŭdinte multajn rakontojn pri prospera farto de l'homoj, kiuj elmigrinte Amerikon, akiris facile rimarkeblan monhavon — decidis

*) *Skotujo (Skoto), Fiŋ(n)ujo (Fin(n)o)* estas cetere korektaj formoj, sed malpli ofte uzataj ol *Skotlando* k. t. p.

**) Raporto aprobita de la Akademio kaj de la Lingva Komitato (Nov. 1922).

***) Al kia ĥaoso gvidas ĉiuj provoj ŝanĝi la zamenhofan tradicion pruvas klare la paĝoj de ribelanta kontraŭ ĝi geneva „Esperanto". Nia Majstro, kiel ĉiam, ankaŭ tie ĉi montris sian genion, ne donante unu solvon al la problemo, kiu pro sia komplikeco *ne povas* esti unuforme traktata. (*Red.*)

provi la samon. Vendinte do sian dometon ŝarĝitan per ŝuldoj, li vorvojaĝis kun restinta mono, trans oceanon kaj elŝipiĝis en unu el marbordaj urboj de Nerda Ameriko.

Kvankam li konis neniun metion, li fidis al sia sprito, forto kaj sano kaj certa estis baldaŭ riĉiĝi — tamen pasis kelkaj semajnoj kaj li trovis ankoraŭ neniun gajnodonantan okupon, vane iradante de unu fabriko al alia kaj petante je laboro. Li jam ekrimarkis, kun ia timo, ke lia mona provizo, pro ĉiutaga ĉerpado, rapide, iom post iom, malpligrandiĝas — kaj antaŭ liaj okuloj stariĝis minaco de l'malvero.

Tial li de nun komencis tre zorge fari esplorajn ekskursojn sur stratoj, por elserĉi nepre ian ajn manieron, por gajni almenaŭ la kostojn de l'seka panpeco.

Tiel vagante tra la urbo, li haltis unufoje antaŭ la ekspozicio de iu rimarkebla magazeno kun farmaciaj kuraciloj. Post la grandega fenestra vitro, inter diversspecaj paketoj, boteletoj kaj skatoletoj, portantaj grandliterajn, ĉiakolorajn surskribaĵojn, kiuj rekomendadis la „marindajn sanigilojn", Marmurek ekvidis du homojn, kiuj sidis sur du seĝoj, ambaŭflanke starantaj. Inter ili, pendis sur ŝnuro, blua karto kun surskribo: — *„Well-Well" mira le etika kuracilo kontraŭ stomaka ĉiaspeca malsano.* Unu el tiuj homoj sidanta dekstre, havis mienon tre suferŝajnan; li sekĉese faradis per tuta korpo iajn malesperajn movojn, kiuj esprimis plej doloran turmenton. Sur lia brusto estis alkroĉita al la vesto, tabuleto kun la vortoj: *„Malsanulo antaŭ la apliko de „Well-Well".* La dua sidanto, oportune apogita en la maldekstra seĝo, vidigis per sia vizaĝo kontentigon kaj bonhumoron. La tabuleto, kiun li havis sur brusto, portis la vortojn: *„Eksmalsanulo post la apliko de „Well-Well".*

Tiu vidaĵo multe interesis nian elmigrulon — tiom pli ke en unu angulo de l'fenestro, li legis sur karto anoncon, ke „la personoj, kiuj dezirus havi profiton pro sidado sur unu aŭ alia seĝo, povas esti dungitaj pohore, laŭ la kondiĉoj priparolotaj en la magazeno."

Por Marmurek, dume senigita de ĉiu profitdonarta agado, tiaspeca novaĵo estis tre dezirinda; li do iris internen kaj trafinte la ĝustan sinjoron, kun kiu li povis pritrakti tiun aferon, li deklaris sian pretecon al jena dungo. La sinjoro alparolita respondis, ke al homo sidanta dekstre, oni pagas por unu horo 2 dolarojn; la sidanto de maldekstra flanko ricevas neniun monon, nur li estas regalita, antaŭ la sidado, per unu porcio da bifsteko kaj duonboteleto da „whisky". Li aldonis ke neniu kandidato povas esti dungita pli ol unufoje tage.

Marmurek rapide elkalkulis, ke preferinde por li estas gajni 2 dolarojn, kiujn li povus uzi laŭ sia plaĉo, ol kontentiĝi per ia malgranda manĝ jo. Li do tuj diris:

— Mi estas preta, sinjoro, sidi sur la dekstra seĝo por 2 dolaroj hore, ĉar ŝajnas al mi, ke la grimacoj, kiujn faras tiu ŝajna turmentitulo, ne estos por mi malfacilaj. Nur mi petas vin, sinjoro, volu dungi min ne por unu horo, sed almenaŭ por du aŭ tri, ĉar mi multe bezonas monon. — La komizo iom ekridetis kaj diris:

— Mi ne dubas, ke via figuro montros tute konvenajn mienojn, por prezenti la frapantan kontraston kun la eksteraĵo de tiu, kiun savis jam la admirinda „Well-Well"; sed post unu horo, vi mem aljuĝos pravecon al nia regularo, kiu allasas la dungitojn nur al unuhora demonstracio tage.

— Do, almenaŭ bonvolu akcepti ĉiutage mian servon; mi estos al v. multe pro tio dankema — diris per petanta voĉo Marmurek.

— Pri tio ni interkonsentos poste, respondis la komizo — dume, ĵus mi vidas, ke la 11a horo estas alveninta; jen la momento de l'anstataŭigo.

Li iris al fenestrego, malfermis ĝin kaj elirigis de tie la ambaŭ sidintojn. Marmurek ekrimarkis kun ia miro, ke la ŝajniga suferulo, eĉ forlasinte sian postenon, havis ankoraŭ malgajan vizaĝon kaj paŝis iom ŝancelante kaj ĝene.

— Tiu homo estas vera malsaĝulo — ekkonsideris Marmurek — anstataŭ ĝoji pro bela salajro, li kurbigas sian figuron kaj grimacas per vizaĝo, kiel se tiu mieno estus al ĝi surgluita. Mi, forlasante tiun seĝon estos ĝojplena kaj saltanta.

Sed li jam ne havis tempon por plue primeditadi tiun temon, ĉar jen la komizo montris al li kaj al la nova kandidato la okupotajn lokojn, aldonante parenteze:

— Mi devas vin sciigi ankoraŭ, ke ĉiuspeca interrompo dum la sidado, forigas la pagon: ĉiu malpacienculo perdas sian gajnon.

— Ho, min tio certe ne koncernos! — ekkriis Marmurek — kaj rapidiĝis al sia seĝo, kiu ŝajnis nun al li, kvazaŭ reĝa trono, kvazaŭ nutrodonanta, benita fonto de bonfarto.

— Sed ho! — kia disrev ĝo!..

En la sama momento, kiam li lokiĝis en la promesplenan tronon, skuigis lin dolora sento: centoj da pintaj najletoj aŭ pingletoj, fiksitaj sur sidloko kaj dorsa apogo, penetrinte lian veston, komencis piki senkompate lian korpon. Lia unua movo estis por saltleviĝi kaj forkuri — sed rimarkinte, tra la vitro, ironie ridetantan vizaĝon de l'magazenisto, kiu lin antaŭsciigis pri perdo de gajno en kazo de l'interrompo, li haltiĝis..

Nun li komprenis la signifon de lia certigo, ke post unu horo, oni jam ne deziras daŭrigi sian taskon; li komprenis la teruran misteron de la martira mieno, kiun li vidis ĉe la antaŭa sidinto — kaj rezignis al sia sorto.

Li devigis sin perforte al persista eltenado de tiu turmento — ĉar postulis tion lia malsato. Li sidis plue: la mienoj, kiuj ŝajnis al li esti lerte artefaritaj de lia antaŭulo, devenis nun ĉe li mem de la kruela situacio, kiel ĝia natura efiko. De tempo al tempo, li nur ĵetadis ĵaluzan rigardon sur la aliflanke apogsidantan feliĉulon, kiu post bongusta regalado, havis radiantan vizaĝon; liaj vangoj floris roze, liaj okuloj gaje ridetis — kaj ŝajnis, ke pro beata ĝuado, li eĉ enfalas en facilan dormetadon.

Marmurek kunpremis la dentojn por ne grinci per ili aŭ ne ekkriadi dolore. Kaj kiam fine komencis soni la dezirata tagmeza horo, nia martirulo, preskaŭ sveninta, levis sin apenaŭ el sia sidejo. Nur kiam li enpaŝis en la magazenon, regajninte energion kaj kurante al la ruza komizo, li ektondris:

— Vi fripono! kiel vi kuraĝis min trompi tiel malnoble!

Tamen ekvidinte lian ĝentilan rideton, kun kiu li alproksimiĝis, por enmanigi al li du novajn bankbiletojn, li eksilentis. La komizo diris trankvile:

— Pri ia ajn trompo, oni eĉ ne povas tie paroli; la interkonsento estis ja laŭregule farita. Jen via pago; vi ĝin prave meritis, farinte bonan reklamon, ĉar, kiel mi vidis, la preterpasantoj haltiĝadis amase por atente observadi vian impresvekantan sintenadon.

— Se mi faris bonan reklamon — ekmurmuris malafable Marmurek — tio okazis tute malgraŭvole, por mi ja estas tute indiferente, ĉu vi havos pro miaj grimacoj bonan profiton aŭ ne!... Ho, se mi estus sciinta pri la falseco de viaj allogaj promesoj, mi estus tuj forkurinta el tiu malbenita magazeno

La komizo — sendube alkutimiĝinta al tiaspecaj riproĉoj, denove nur ekridetis kaj aldonis tiujn vortojn:

— Ĉiukaze, se vi decidiĝus ankoraŭ reveni iam ĉitien, por ripeti la horsidadon, ni vin akceptos volonte.

Marmurek, por tuta respondo, forirante, laŭte frapfermis la pordon...

Tamen, post unu semajno, kiam liaj bezonoj ensorbis la gajnitajn dolarojn, li denove, kun humila mieno aperis en la sama magazeno, por ripeti la profitdonantan, kvankam dolorigan okupon. Kaj tio ankoraŭ kelkfoje okazis, ĝis

kiam, post multaj klopodoj, li sukcesis fine trovi laborlokon en iu el teksaj fabrikoj, kiu prokuris al li malgrandan, sed almenaŭ sufiĉantan vivrimedon.

Tiam li konvinkiĝis, ke ne estas tiel facile tuj riĉiĝi en Ameriko, kiel li supozis, laŭ la rakontadoj, multfoje inter la konatuloj aŭdataj.

Helena Hempel, Lwów.

EL LA INTIMAĴOJ DE LODZ'A ESPERANTUJO.

II.

FRAGMENTO

el stancoforma kuirverko.

Ho ve! rigidaj estas fingroj miaj —
Silentas kord'... Ne ŝprucas jam kaskado
De tiuj tonoj tiel harmoniaj,
For trubadura tiu-ĉi kantado!
Finiĝis noktaj horoj la pasiaj
Kaj ĝisfantita mia serenado:
Ne plu ŝteliros mi dum nokt' malhela
„Kun la gitar' sub basko la mantela".

Rigida jam, ho estas mano tiu,
Tremanta iam sur la kordojvico:
Ne plu ordonos mi, ke liro kriu,
Je de la bela amatin' kapricco...
Ŝ', se ne scias. fine jam eksciu,
Ke mi naiva ne estas novico.
Kiu en nokto, kaŝite sub muro,
Atendas... je la mansving' kun plezuro.

Rigida jam ho estas tiu brako,
Tiom servema por la ĉarmu linoj:
Min ne atingas jam ama atako
De la poetaj nimfoj aŭ feinoj —
Stulta mi „kiel en la korn tabako"
Je ekrigardoj, je la kapekklinoj.
Fine... en de la sentoj labirinto,
Kiu sin turnus al la edziĝinto! ?

Tiel, fininte kun vojon dornan
De disreviĝoj, de la korokrevoj —
Mi liron, tiun-ĉi maŝinon tornan,
Skulptantan ondojn de l'sent' suprenlevoj

— Anguion ĵetis... kaj geston kotornan,
Se mi ankoraŭ uzas en la revoj,
Do nur en siaj, kiuj per la kanto
Pasion lastan sonĝas... al Fajfanto.

Ho, al Fajfanto! ne punu min dioj,
Ke kvankam firme daŭras tiu amo,
Tiom malmultaj fluis melodioj
El tiu liro... Por sentoj-ornamo
Hiller jam milajn kreus idiliojn —
(Kia por Fajfo ĝi estus reklamo!)
— Kaj mi silentas... dume „Idealo"
Atendas en la kun duboj batalo.

De kaprioloj klaŭnaj, ho lullo,
Frivole arogantа instrumento!
Disagordita harda muzikilo —
Liro Viktora, muta en silento —
Ĉar jen dormetas vi nun en tran' vilo,
Ne vekiĝante eĉ por la momento,
Iu supozi povus (hom' naiva.) —
Ke vi ne spiras plu, ne estas viva!

Iu supozos (ho orangutango!)
Ke la Viktora faŭko babilema,
„Mutas" pro iu pipso sur la lango,
Kvazaŭ kokina beko laborema...
Iu supozos... Fra kasu lavango
Ĉi-stultan kapon! — bleko rekviema
Iom tro frua, ĉar Viktora liro
Malsanas sole... je mank' de l' inspiro.

Mank' de l' inspiro... ĉu ties foresto
Perfidas eble malplenon de koro?
Am' al Fajfanto ĝi ne estas nesto
Por iu vanta kulto aŭ adoro:
En ĝi prezentas sin en plen' majesto
De Esperanto nia tut' valoro!
Kaj ĝi — la lingvo tiu ĉarma —
Ĉu povas lasi la koron malvarma?

Oni parolis, ke por cel' vulgara,
Ke por marĉanda budo ĝi eksonos,
Por butikisto el foir' najbara,
